

LA REGULARO DE LONDONA ESPERANTO-KLUBO

Fondita en 1903

Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street, NW1 2LW

Ĉi tiu eldono de la kluba regularo, bazita sur teksto kiun konfirmis la jarkunsido de marto 1998, enhavas ĉiujn amendojn ĝis 2006 aprobitajn.

1. Nomo

La nomo de la klubo estu “La Londona Esperanto-Klubo” (anglalingve “The London Esperanto Club”).

2. Celoj

La celoj de la klubo estu progresigi la studadon kaj disvastigon de la internacia lingvo Esperanto, provizi kunvenejon kaj aranĝi kunvenojn por Esperantistoj, okazigi kursojn pri Esperanto kaj akcepti Esperantistojn el aliaj regionoj kaj landoj.

3. Neŭtraleco

Inter rasoj, nacioj, religioj kaj politikaj partioj la klubo estu neŭtrala. Tamen ĉi tiu regulo ne malpermesu la okazigon de parolado aŭ diskuto pri tiaj temoj.

4. Aneco

- a) Por fariĝi ano oni skribe akceptu sur kluba aniĝilo la kluban regularon, eventuale pagu kotizon laŭ regulo 5(a) kaj ricevu aprobon de la konsilantaro
- b) La devoj kaj rajtoj de aneco por ĉiuj anoj estu samaj, krom pago aŭ nepago de kotizo kaj registriĝo laŭ regulo 5.

5. Kotizoj

- a) Kotizoj estu pagendaj je aniĝo kaj ĉiujare je la unua de januaro. Nova membro kiu aniĝas post la fino de junio rajtu ricevi kvindek-procentan rabaton por tiu jaro. Kluba aferkunsido decidu kotizojn por anoj en jenaj kategorioj:
 - i) Ordinara
 - ii) Subtenanta (paganta pli altan kotizon por helpi al la klubo)
 - iii) Juna (ankoraŭ ne havanta 18 jarojn)
 - iv) Studenta (ĉefe okupata pri studado kaj ordinare ne mongajnanta)
 - v) Fora (loĝanta pli ol 25 mejlojn for de Charing Cross)
 - vi) Edzo aŭ edzino de ano en alia kategorio.Ĉiu, kiu troviĝas en unu el la kategorioj (iii) ĝis (vi) rajtu elekti tiel registriĝi.
- b) Tiu, kiu unu fojon pagas 20-oble la kotizon de ordinara ano, fariĝas Dumviva Membro, kaj estas sen plua kotizado ano de la Klubo ĝis sia morto.
- c) Honora ano elektita de la konsilantaro ne pagu kotizon.

6. Jarkunsido

- a) Kluba aferkunsido okazu ĉiujare antaŭ la fino de marto post minimume dekkvartaga avizo al la anoj.
- b) En la tagordo estu:
 - i) Protokolo de la lasta jarkunsido kaj aliaj klubaj aferkunsidoj poste okazintaj
 - ii) Raporto pri la lasta jaro
 - iii) Jarfina bilanco kaj speza konto
 - iv) Elekto al honoraj oficoj kaj al la ĉefaj funkciaj oficoj laŭ regulo 7
 - v) Elekto de konsilantoj kaj kontkondrolistoj
 - vi) Aliaj aferoj

7. Oficoj

- a) Honoraj oficoj
La klubo rajtu havi patronojn, honoran prezidanton kaj honorajn vic-prezidantojn, kiuj ne estu pro tiaj oficoj anoj de la konsilantaro.
- b) Funkciaj oficoj
 - i) La ĉefaj oficistoj estu: prezidanto, du vicprezidantoj, sekretario, kasisto, registristo.
 - ii) Aliaj estu: du kontkondrolistoj (kiuj ne rajtu esti konsilantoj), okupantoj de oficoj eventuale starigitaj de la konsilantaro.
 - iii) Kandidato por funkcia ofico estu ano de la klubo.

8. Konsilantaro

- a) Konsisto
La konsilantaro konsistu el la anoj elektitaj al la ĉefaj funkciaj oficoj kaj ĝis dek unu aliaj anoj elektitaj dum la jarkunsido.
- b) Devoj
La konsilantaro havu la devojn:
 - i) Kunsidi laŭbezone
 - ii) Administri la aferojn de la klubo laŭ ĉi tiu regularo
 - iii) Ĉiujare prezenti al la jarkunsido jarfinan bilancon, spezan konton kaj raporton pri la laboro de la lasta kalendara jaro
 - iv) Dum la unua konsilantara kunsido post la elekto de la konsilantaro, elekti du konsilantojn al la direktora komitato
 - v) Aprobi aŭ malaprobi petojn por aniĝo
 - vi) Eventuale kunvenigi aferkunsidon de la klubo laŭ regulo 11(a)

c) Rajtoj

La konsilantaro havu la rajtojn:

- i) Plenigi vakajn oficojn
- ii) Starigi subkomitatojn kaj kromajn oficojn kaj elekti al ili anojn, kiuj ne estu pro tia elekto anoj de la konsilantaro
- iii) Starigi regulojn por la funkciado de subkomitatoj kaj de la direktora komitato.
- iv) Elekti honorajn anojn.
- v) Eksigi anon aŭ honoran anon, sed necesu jese voĉdonanta plimulto de la tuta konsilantaro, kaj la koncerna persono havu rajton pledi al la konsilantaro kontraŭ la eksiga propono
- vi) Rekomendi kandidatojn por la honoraj oficoj al la konsidero de la jarkunsido
- vii) Kunvenigi aferkunsidon de la klubo laŭ regulo 11(b)

9. Direktora komitato

a) Konsisto

La direktora komitato konsistu el la prezidanto, la du vicprezidantoj, la sekretario, la kasisto, kaj la du konsilantoj elektitaj tiucele de la konsilantaro.

b) Devoj

La direktora komitato havu la devojn:

- i) Trakti urĝajn aferojn, kiuj bezonas decidon antaŭ ol estas eble kunvenigi la konsilantaron
- ii) Funkcii kiel subkomitato, se tiel elektita de la konsilantaro
- iii) Raporti pri siaj agoj al la sekvanta konsilantara kunsido.

10. Daŭro de elektiteco

Elekto farita de kluba aferkunsido restu valida ĝis la sekvonta jarkunsido aŭ ĝis pli frua speciala aferkunsido tiucela.

Elekto farita de la konsilantaro laŭ regulo 8 (c)(ii) aŭ (iv) restu valida ĝis ties kontraŭa decido.

11. Speciala aferkunveno

Speciala aferkunveno okazu pro: (a) ricevo de tiucela peto al la konsilantaro subskribita de almenaŭ 25 anoj aŭ (b) decido de la konsilantaro.

La anoj ricevu minimume septagan avizon pri la kunsido, kiu okazu ne pli ol dudek unu tagojn post ricevo de la peto.

La peto kaj la avizo precize difinu la proponata(j)n rezolucio(j)n.

12. Kvorumoj

Kvorumo ĉe kluba aferkunsido estu okono de la membronombro en la lasta aprobita jarraporto kun minimumo de sep.

Kvorumo ĉe konsilantara kunsido estu kvin.

13. Lingvo

La funkcia lingvo por ĉiuj kunvenoj kaj dokumentoj estu Esperanto, sed ĉi tiu regulo ne malpermesu la uzon de alia lingvo pro aparta bezono.

14. Regularo

Ĉiu ano ricevu unu ekzempleron de la regularo senpage. Por fari ŝanĝon en la regularo estu necesa du-triona plimulto en jarkunsido aŭ en speciala aferkunsido okazigita tiucele.

-- fino --